

Michael



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj \ 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj \ 44 - Nantes

P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1967

4 - 5

El Grésillon

Jam Septembro ! La kastelo malpleniĝis. En la salono lo foteloj staras, kiel objektoj senu-tilaj. Neniu rido, neniu parolo plu eĥigas en la koridoroj. La sonorilo silentas. La birdoj fariĝas pli aŭdacaj.

Sed, tute certe, la muroj ne forgesis la kvin cent personojn, kiuj pli malpli longe restadis tie. Eĉ la muroj ne forgesas la simpatiajn vizaĝojn, la agrablajn okazintaĵojn, kaj ili konservas iom el la amikeco-plena etoso por ĝin redoni venontan jaron.

Kvankam, bedaŭrinde, la I.O.E.-renkontiĝo ne okazis, la unua periodo estis sufiĉe sukcesa. La kursoj gvidataj de S-ro Ribot kaj S-ro Giloteaux estis diligente ĉeestataj de gelaboremuloj, dum aliaj homoj preferis ĝui la belan veteron. Ĉiuj kunvenis vespere por rigardi filmojn kaj diapozitivojn, aŭ partopreni en ludoj. La 23-an de julio alvenis gesamideanoj el diversaj landoj por aŭskulti la prelegojn de Ge-sroj Roose, S-ino Cheverry, S-ro Guillot. La ekskursoj renkontis la kutiman sukceson, ĉefe la aŭtobusa irado laŭlonge de la « Vojo de la Vinjoj ». Gojo-plena etoso regis dank'al ĉiuj ĉeestantoj ; ni aparte menciu niajn nun de longe karajn amikojn hamburgajn.

La 6-an de Aŭgusto ekkomenciĝis nova periodo kun multaj partoprenantoj (kelkafoje pli ol 100). Ankaŭ tre grava periodo pro la laboro farita, la komunaj distraĵoj partoprenitaj, la novaj amikaj rilatoj kunplektitaj. Periodo riĉa je interesaj kaj ĝojigaj travivaĵoj. Mi unue pensas pri la bedaŭrinde tro mallonga restado de Ges-roj ITO el Japanio, tiom entuziasmaj kaj sindonemaj, kiuj



lasis en niaj koroj la certecon, ke la idealismo povas transloki montojn. Sed la montoj estas tiom multaj ! Alispecaj travivaĵoj agrablaj estis la komunaj promenadoj (la partoprenantoj en la nokta promeno al la dolmeno, certe ne forgesis ĝin), la ralio al Le Mans kaj la « ĝimkano » (kondukprovoj diversaj en la parko), kiuj ebligis la aŭtomobilistojn montri sian lertecon kaj sian spritecon. Ni ne forgesu la speciale interesajn vesperkunvenojn, tre agrablajn pro la partopreno de ĉiuj, junaj kaj mapli junaj, ĉefe de Ges-roj Fort, kaj de la aktoroj gvidataj de S-ro Lenel. Tiuj aktivaj, kaj la kursoj pri bindado de libroj kaj korbifarado (gvidataj de Ges-roj Dairon) ne malebligis la pure esperantan laboron. La kursoj estis multe vizitataj kaj la rezultoj de la kvar ekzamenoj montras, ke tiu laboro estis tre fruktodona.

La lasta periodo (27-an de Aŭgusto - 10-an de Septembro) estis pli sukcesa ol lastan jaron. Denove S-ro Ribot gvidis kursojn, kiuj multe progresigis ĉiujn ĉeestantojn. Kaj la someraj aktivaj finis en la bruo de la maŝinoj ! Car jam oni preparis la purigadon de la lageto, kiu jaron post jaro pli kaj pli ŝlimiĝis. Ĝi konservas el la juspasintaj someraj tagoj la deziron fari sin bela, pli plaĉa por siaj amikoj, kiuj certe estos ankoraŭ pli multaj en 1968.

INFANA VIDPUNKTO PRI LA UNUA STAĈO EN GRÉSILLON

Ĉe nia alveno la 2-an de julio je la 11-a vespere, S-ino Cheverry donas al ni la ĉambron numero dudek tri, tre bela, kun multe da bildoj sur la muroj kaj aparta tualetejo.

En la mateno, ni havis la grandan plezuron saluti ĉiujn homojn. Post la matenmanĝo, ni agreble vizitis lo kurson de S-ro Ribot, kiu estas tre afabla.

Post unu tago, ni naĝis en la granda banejo.

Ni estis tri knabinoj Lisbeta, Marteno kaj mi ; ĉiu el ni tre ŝatis bani.

En Grésillon ankaŭ estas tre bela lago, arbarkaj infangardeno.

Ni venis en Grésillon dank'al S-ino Vincent ; ŝi estas tre afabla kaj ĉiam parolas al ni Esperanton.

Ni multe, multe dankas S-inon Vincent pro ŝia granda afableco.

Vivu Grésillon kaj vivu Esperanto !

PANNIER Veronika, 12-jaro knabino.

Esperanto tra la Mondo



Kongresoj kaj renkontiĝoj :

— **U.K. en Rotterdam** : malgraŭ la lastmomenta decido translokiĝi la 52-an Universalan Kongreson de Esperanto, ĝi disvolviĝis en bonaj kondiĉoj. Ĉirkaŭ 700 aliĝintoj povis efektive partopreni. Diplomatoj el 16 landoj ĉeestis la inaŭguran kunvenon. Tri rezolucioj estis aprobitaj. La unua kiu, altiris la atenton de la presagentoj, protestis kontraŭ la sinteno de U.N. Sekretariato kiu ne transdonis al la ŝtatoj la internacian peticion pri esperanto ; la dua proklamas la gravecon de la internacia lingvo por la « vastigo kaj profundigo de la amikaj rilatoj inter la popoloj, unu el la esencaj antaŭkondiĉoj por la monda paco ». La tria rezolucio emfazas, ke la sola racia kaj justa maniero por doni al la turismo la necesan kulturan enhavon estas la ĝeneraligo de la praktika uzo de esperanto ».

La 53-a U.K. okazos en Madrido de la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto.

— **S.A.T. Kongreso** : Ĝi okazis en Malmoe en Julio kun 430 partoprenantoj el 17 landoj. Okazis interesaj prelegoj kaj diskutoj, bela kultura vespero kaj ekskurso al Frostavallen, Lund kaj Orienta Skanio. La 41-a kongreso okazos en Utrecht, Nederlando.

— **Junulara Kongreso** : Ankaŭ okazis en Roterdamo. La ĝejnuloj loĝis en la nove ekipita ŝipo « Jan Backx ». Kultura kaj distra programo kompletigis agreeble la pure laborajn horojn. Juna Japanino estis proklamita « Miss Esperanto 1967 ».

— 150 esperantistoj el 16 landoj kunvenis en Innsbruck, inter la 23-a kaj la 30-a de Julio, por Eŭropa Esperanto-Konferenco. Krom ekskursoj kaj prelegoj, la teatra sekcio de Studenta Esperanto-Klubo de Zagreb prezentis deklamadon de poemoj kaj « La Urso » de Ĉekov.

— Dum Julio, en la kadro de la tradicia baltmara semajno, okazis en Rostock (Orienta Germanujo) tritaga Esperanto-Konferenco en kiu partoprenis 73 gastoj el 6 landoj. Raportis kaj intervjuis radio kaj televido.

— Laŭ la ekzemplo de la famaj kulturaj festivaloj de Bulgara Esperanto-festivalo, ankaŭ en Hungario okazis en Dunkeszi la unua tia festo valo kun 245 ĝejnuloj.

El Hungario :

La Hungarlanda esperanto-biblioteko en Szeged eldonis sian 288-paĝan katalogon. La tri plej grandaj esperanto-bibliotekoj en la mondo estas tiuj de Nacia Biblioteko en Vieno, de la Brita Esperanto-Asocio en Londono kaj de U.E.A. en Rotterdam.

El Usono :

La filmo de J.L. Mahé « Angoroj » estis prezentita de la Kino-Klubo en la U.N.-sidejo en Novjorko, la 19-an de Septembro.

— Sekve de televida dissendo en Novjorko, la esperanta Inform-Centro ricevis pli ol 600 informpetojn pri la internacia lingvo.

El Orienta Germanujo :

La esperantistoj organizitaj en la kadro de la Kulturligo de Germana Demokrata Respubliko nombras 1.230 ; ili apartenas al 45 distriktaj rondoj.

Novaj eldonaĵoj :

— Aperis la unua eldono en la internacia lingvo de « Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong ». Krom tiu 343-paĝa libreto, jam aperis en la lastaj jaroj, 19 aliaj verkoj de Maŭ Zedong en esperanta traduko.

— La lasta numero de « Espero Katolika » entenis supleme la tekston de « Populorum progressio », la lasta fama encikliko de Paŭlo la 6-a.

— A.N.V.V., la oficiala nederlanda turismoficejo sendis al 400 turismoficejoj en Nederlando « konversacian esperanto-kalendaron ». Ĝi konsistas el 50 disŝireblaj folioj ; ĉiu el ili enhavas tre utilajn priturismajn foliojn en esperanto apud la nacilingva traduko.

— Universala Skribo de Manuel Halvelik, uzota kiel simbologia sistemo fonetika, kaj kiel internacia regularo por reformi la skribmanieron de ĉiu ajn lingvo.

— « Freŝa mateno » tradukita romano de Reuven Kritz, israela verkisto, eldonita en Israelo.

— « Utila manlibro pri Hindujo » de S-ino Haudebine.

— Diskoj : « Poezioj de Julio Baghy » ; deklamas membroj de Studenta Klubo el Zagreb.

— Longdaŭra disko « Jen mia mondo » : Duo Espera kantas Dylan kaj Seeger.

— S.A.T.-Amikaro eldonis serion de 5 esperanto-diskoj por kompletigi la lerno-libron « Junul-kurso ».

Radio kaj filmoj :

— La kongresanoj en Roterdamo povis vidi la 20-minutan koloran desegno-filmon de sendependa kalifornia T.V.-filmisto Richard Brace. Bazita sur desegnaĵoj de usonaj kaj japanaj lernejoj ĝi rakontas pacifisman historion pri infanoj.

— En la sidejo de Vroclava Esperanta Klubo estis instalita kurtunda amatora radiostacio, kiun priservas 15 esperantistoj. La elvoksigno de la stacio estas SP-6-PAM. Oni povas ekligi kontaktojn kun la stacio, ĉiun sabaton kaj dimanĉon vespere.

ROBERT HOUDIN



Majstro de la Magiistoj (II)

NEVERSAJNA EKSPERIMENTO

GLORO KAJ RIPOZO

Drasta ekzemplo de la majstreco de Robert-Houdin estas la eksperimento, kiun li faris antaŭ la franca reĝo Louis-Philippe (Ludoviko-Filipo) kaj ties familio.

Petinte naskukon de ses el la ĉeestantoj, li faris pakajeton el ili. Li poste disdonis kartetojn, por ke ĉiu skribu lokon kie li deziru ke la paketo estu magie transportita. Kaj li petis de la reĝo, ke li hazarde prenu tri el la kartoj, kaj elektu unu el ili. Per sia magia povo, la sorĉisto sendos la poŝtukojn en la indikitan lokon. Tiu loko estis unu el la kestoj, kie kreskas oranĝarboj lokitaj en apuda galerio. La magiisto kovras la pakajeton per kristala kloŝo netraversebla, signas per la magia vergeto, deprenas la kloŝon. La poŝtukoj malaperis. En ilia loko staras turto kun rubando ĉirkaŭ la kolo. Laŭ ordono de la reĝo, oni esploras en la elektita kesto. Inter la radikoj de la oranĝarbo estis trovita rustita fera skatolo. Ĝi estis ŝlosita, sed feliĉe, ŝlosileto pendas ĉe la kolo de la turto. La reĝo malfermas la kesteton kaj trovas... pergame-non, kun la jena skribajo :

« Hodiaŭ 6an de junio 1786.

Tiu fera skatolo entenanta ses poŝtukojn estis lokita inter la radikoj de oranĝarbo fare de mi, Balsamo grafo de Cagliostro por utili al faro de magia ago, kiu estos farata post sesdek jaroj ekde tiu tago, antaŭ Louis-Philippe d'Orléans kaj lia familio. »

Aŭtentigis la skribaĵon la subskribo kaj la sigelo de Cagliostro. Sub la pergamento kuŝis la paketo de poŝtukoj sigelita de la sama sigelo !

Sendube, tiu nekredebla magiaĵo estis zorge antaŭ-preparita de Robert-Houdin. Sed kiel kaj kiam la sorĉisto povis enmeti la skatolon sub la oranĝarbo ? Ĉu li havis helpanton ? Plie, oni povas konjekti ke, la sorĉisto lerte ŝanĝis unu el la kartoj. Ĉu la reĝo ne konis la skribmanieron de siaj familianoj ? Kial, li precize elektis la karton preparitan de la magiisto ? Ĉu tiu-ĉi sugestis la reĝon ? Kial, ĉiuj ĉeestantoj — ne eĉ la reĝo — ne konsideris la leteron de Cagliostro kiel mistifikacion (kio ĝi ja estis) ? Nesolveblaj demandoj, ĉar Robert-Houdin neniam rivelis la sekreton.

oOo

En Francujo, la politika situacio fariĝis malfacila, kaj fine, en 1848, eksplodis la revolucio. Kompreneble, tio malplenigis la teatron. Tial, Robert-Houdin akceptis inviton iri en Anglujon. Tie, li ricevis sukceson eĉ pli grandan ol en sia lando. Li estis petata prezenti sian spektaklon antaŭ reĝino Victoria. Ĉeestis, krom la reĝino kaj la tuta brita nobelaro, alilandaj princoj. Inter ili estis la estonta imperiestro Napoleono III. En siaj memoraroj, la magiisto lirike priskribis tiun eventon. Poste li faris triumfan vojaĝon tra Britujo.

Reveninte Francujon, Robert-Houdin retrovas la saman sukceson kiel antaŭe. Sed nun, li bezonas ripozon ; li estos baldaŭ 50-jara* ; la streĉa ĉiutaga laboro fariĝas laciga. Kaj estas jam tempo realigi la jam longe aspiritan deziron : dediĉi sian tutan tempon al siaj ŝatataj studoj pri elektro kaj oftalmologio.

Fine, en 1852, vendinte sian teatron al sia bofrato, li retiriĝas en bieno nomita « la Priorejo », en Saint-Gervais, vilaĝo proksime de Blois, lia naskiĝurbo.

La Priorejo rapide akiris reputacion de « ensorĉita domo ». Kiam oni frapis ĉe la enireja krado, ĝi malfermiĝis tute sola, sonorilo bruis en la domo en la fundo de l' parko, ĝis la fermo de la pordo. Se la poŝtisto enŝovis korespondadon en la leterkeston, avertilo funkcias en la domo. Multaj aliaj strangaĵoj okazis en la bieno.

Krom tiuj amuzaj, foje mistifikaj aplikoj de elektra forto, Robert-Houdin serioze laboris. Li ricevis premiojn pro diversaj inventaĵoj okaze de la Universala Ekspozicio en 1865. Li konstruis la unuan elektran distribuilon. En 1863, okaze de familia festo, li lumigis la salondon kaj la parkon per elektraj lampoj kun vegeta fadeneto (kredebla el kano). Do, antaŭ Edison, li trovis solvon por la inkandeskaj lampoj. Ankaŭ li faris la unuan elektran brustonon por skermistoj. En 1867, li prezentis al la Internacia Kongreso pri oftalmologio aparatojn, kiuj estas la pratipoj de tiuj nun uzataj.

oOo

JE LA SERVO DE SIA LANDO

Tiu laborema kaj fruktodona ripozo estis interrompita dum kelkaj monatoj laŭ tute ne atendita maniero.

La franca registaro petis ian helpon por la pacigo de Algerio. Kiom eksterordinara kaj stranga tio povas aperi, ĝi okazis kaj plene sukcesis. En siaj memoraĵoj, Robert-Houdin klarigis la naturon de la misio, kiun li akceptis :

« Oni ja scias, ke la plej granda nombro de ribeloj, kiujn oni devis haltigi en Algerio estis instigitaj de intrigantoj, kiuj diris ke ili estas inspiritaj de la Profeto... Nu, tiuj falsaj profetoj, tiuj sanktaj marabutoj, kiuj, fakte, ne estas pli sorĉistoj ol mi — eĉ ili estas tio malpli ol mi — tamen sukcesas ekflamigi la fanakitismen de siaj samreligiaj per jonglaĵoj tiel primitivaj kiel spektantoj antaŭ kiuj ili estas prezentataj... Oni esperis, prave, komprenigi al la Araboj, helpe de miaj spektakloj, ke la artifaĵoj de iliaj marabutoj estas nur infanaĵoj kaj ne plus povas, pro sia naiveco, prezenti miraklojn de la Plejaltulo... »

La franca magiisto do akceptis la taskon kaj, en septembro 1856, alvenis en la ĉefurbo, Alĝero, okaze de grandaj festoj organizitaj de la franca registaro. Kaj ĉi mirinde plenumis sian mision.


La neelĉerpebla botelo disdonis bonegan kafon kaj teon kun mento. Atletoj senfortiĝis laŭ la volo de la franca sorĉisto kaj fariĝis malkapablaj suprenlevi la misteran kesteton. Arabo, kiu konsentis grimpi sur la scenejon subite malaperis, kaj estis retrovita sur la perono de la teatro, konfuzega, neniel komprenante kio okazis al li. Floroj, bukedoj, ghirlandoj aperis subite, ŝvebis en la aero...

La pli impresiga eksperimento ja estis la pruvo de la nevundebleco de Robert-Houdin. Iu araba sorĉisto minacis al li, kriante : « Mi cin mortigos ! » La Franco venigis lin sur la scenejon, donis al li militistan revolveron kaj petis de la Arabo, ke li mem ŝargu la armilon, markinte sur la plumba kuglo ian signon per sia tranĉilo. Poste, la magiisto staris ie ĉirkaŭ du metroj de lia « mortigonto » kaj diris al li : « Pafu ! ». La Arabo pafis. La franco ne estis vundita, kvankam sendube trafita, ĉar la kuglo aperis inter liaj dentoj. La pafinto mirege konstatis, ke tiu kuglo estis tiu mem, kiun li markis ! Kviete, Robert-Houdin diras : « Se mi volus, mi cin mortigos. Rigardu ! » Li pafas al la blanka muro. La kuglo trafas, kaj sanga makulo aperas. La Arabo, per la fingro prenas iom el tiu sango, gustumas kaj konfesas : « Ĝi certe estas homa sango ! Ĉi estas vera sorĉisto ! »

Robert Houdin eksplikis la artifaĵojn. Ĝi ia tute ne estas mistera ; sed ĝi postulis tiom da genia imago, da supera lerteco, ke estas dubeble ĉu iu el niaj modernaj magiistoj povus ĝin fari kun plena sukceso.

Oni povas imagi kian teruron sentis la Araboj pro tiaj sorĉaĵoj ! Sed la interpretistoj estis ordonitaj diskonigi, ke la mirakloj de la franca magiisto estas nur artifaĵoj, rezultoj de arto nomita « prestidigito », kaj tiel, prui ke la sanktaj marabutoj estas nur jonglistoj kaj trompisto.

Kreskis admiro kaj respekto al la Francoj. La tuta prestiĝo de la arabaj sorĉistoj disfalis. La franca supereco agnoskita kaj akceptita, la ribeloj ĉesis. Tiel ekregis paco, multe da verŝota sango estis domaĝita, kaj elradikiĝis potencaj superstiĉoj.



Omaĝo de la Araboj tribestroj al Robert-Houdin (oktobro 1856)

GENIA ILUZIISTO, SCIENCISTO, PATRIOTO

Per tiuj tri nomoj oni povas karakterizi tiun eksterordinaran viron, Robert-Houdin. Vere stranga homo li estis kiu, per semegalaj imago kaj lerteco kunigis du ekstremojn ; artisma mistifikado kaj pionireco de vera sciencisto. Jam neĵuna, pli ol 50-jara, li konsentis rompi sian ripozon, interrompi siajn ŝatatajn studojn, entrepreni laciĝan vojaĝon por helpi al sia patrolando : Ni menciuj ankaŭ ke, Méliès la pioniro de kinematografio, kreinto de la « truko » kaj « specialaj efektoj » de la sepa arto, multe ŝuldis al liaj konsiloj kaj kunlaborado.

Robert-Houdin mortis en Saint-Gervais, en la jaro 1871a, estante 66-jara.

E. MOTILLON.



EN LA ĈIRKAŬAJÔ DE GRESILLON

LA ABATEJO DE SOLESMES

Ĉe la bordo de la rivero Sarthe, apud Sablé, en Solesmes staras la impona Abatejo Sankta Petro. Plej bela ĝi estas vidata de la alia flanko de la rivero. De tie oni povas admiri ĝian 15-jarcentan turon, kun bazo de la 11-a jarcento. Ĉe la dekstra flanko situas la Priorejo konstruita en la komenco de la 18-a jarcento. Sur la maldekstra flanko vidiĝas granda konstruaĵo 60-jara, kiu memorigas samtempe pri Monto Sankta Mikaelo kaj la Palaco de la Papoj en Avignon.

La preĝejo, kiun la turistoj povas viziti estas tre bela. La fasado estis konstruita en la 15-a jarcento, kaj interne, la navo konservas romanikajn arkadojn. La tre interesaj skulptaĵoj videblaj en la dekstra kaj maldekstra transeptoj estis faritaj en la 15-a kaj 16-a jarcentoj.

La vivo de la monaĥoj estas dediĉita al preĝado. Ĉiutage la Solena Meso estas kantita kaj ankaŭ parto de la nokta diservo. Kompreneble la monaĥoj partoprenas en la materialaj laboroj necesaj. Sed ili ĉefe studas liturgion kaj teologion. Kelkaj el ili sin dediĉas al sankta arto; aliaj redonas al la gregoria kanto, tradicia kaj oficiala kanto de la katolika eklezio, ĝian primitivan purecon. Tiu lasta aspekto de la laboro de la monaĥoj de Solesmes, donas al la Abatejo grandan famecon tra la tuta mondo, kaj multaj estas la muzikantoj, kiuj ĉeestas la kantitajn diservojn.

La « malgrandaj tragedioj »

de PUŜKIN

Aleksandr Sergiviĉ Puŝkin estas konata, kiel la plej granda rusa verkisto, eĉ kiel unu el la plej grandaj tutmondaj verkistoj. Li estas la kreinto de la moderna rusa literaturo, oni eĉ povas diri, ke li kreis la modernan rusan literaturan lingvon. Naskiĝinta en 1799, li mortis en 1837 en duelo kun la franca elmigrinto Dantes.

Kiam oni parolas pri Puŝkin, oni pensas pri poezio, kaj efektive grandega parto de lia verko konsistas el versaĵoj. Apud liaj multnombraj lirikaj poeziaĵoj elstaras liaj poemoj « Ruslan kaj Ludmila », « Kaŭkaza mallibero », « Ciganoj » kaj la romano en versoj « Eŭgeno Onegin », el kiu Ĉajkovski verkis mond-faman operon, kaj kiu estis tradukita en Esperanton de Nekrasov.

Sed la influo de Byron, kiu, kiel por Lermontov, sentiĝas en la unuaj verkoj de Puŝkin, cedas lokon en la dua parto de lia vivo, post lia ekzila restado en Kaŭkazo, al la influo de Shakespeare. Plie, Puŝkin interesiĝas pri historio kaj verkas ĉefe prozaĵojn kaj teatraĵojn. Tiel li verkas en 1825 la tragedion « Boris Godunov ». En 1830, jaro aparte fruktodona, dum kiu li finverkas « Eŭgeno Onegin », komencitan ses jarojn antaŭe, li verkas la famajn « Novelojn de Belkin » kaj la Malgrandajn tragediojn. Dum la postaj jaroj aperas Dubrovski, la Kapitan-filino, la Damo de Piko.

Se estas vere, ke Puŝkin verkis siajn teatraĵojn en la lastaj jaroj, li tamen ĉiam interesiĝis pri teatro. Ankorau infano, li legis Molière kaj verkis komedietojn laŭ la imito de Molière. Poste li interesiĝis pri Corneille, Schiller, Shakespeare, Goethe, Hugo. Ĝustas menciinde, ke antaŭ Puŝkin ne ekzistis originalaj rusaj tragedioj.

En la epoko de « Boris Godunov » (1825), la ideoj de Puŝkin pri teatro kontraŭstaras la klasikan sistemon pri unueco de loko kaj tempo : « La vereco de la pasioj, la verŝajneco de la travivaĵoj en la donitaj cirkonstancoj, jen kion nia spirito postulas de teatra verkisto ». 1825 estas ankaŭ la jaro de la reeldono en Francujo de « Racine kaj Shakespeare » de Stendhal, eldonita du jarojn pli frue. Reziĝninte pri la unuecoj de loko kaj tempo, Puŝkin tamen konservas la unuecon de agado (kvankam apenaŭ en Boris Godunov !)

La t.n. « malgrandaj tragedioj », estis verkitaj en 1830. Tiam Puŝkin konsideras Boris Godunov « arkaika »

kaj sin turnas al tute nova formo de dramaturgio. Unue, li interesiĝas pri la temoj kaj historiaj okazintaĵoj de okcidento, aparte sub la influo de la verko de MÉRIMÉE « Les Jacqueries », « Hernani » de V. Hugo vekas en li la intereson por alilanda « loka koloro ». Fine, sub la influo de la brito Barry-Cornwall kaj de liaj « Dramatic Scenes » li iniciatas formon de tre mallonga teatraĵo, en kiu, anstataŭ longa disvolvigo de la agado, oni prezentas nur ties kulminon, la momentan, subitan eksplodon de la sentoj kaj pasioj, kiu rivelas la ĉefajn karaktertraĵojn de la herooj. Li verŝajne estis influata ankaŭ de la « Teatro de Clara Gazul » de MÉRIMÉE. En tiuj « malgrandaj tragedioj », la konfliktoj estas limigitaj, la peripetioj rapidaj, la nombro da roluloj malgranda. La aŭtoro celis prezenti « fortajn emociojn kaj krueblajn krimojn ».

Dum Boris Godunov prezentis Rusujon, la Malgrandaj tragedioj prezentas la neslavan Eŭropon. La unua teatraĵo : « La Avara Kavaliro » okazas en la feŭda Francujo, la dua, « Mozart kaj Saljeri » en Germanujo, la tria, « La Ŝtona Gasto » (t.e. Don Juan) en Hispanujo, la kvara, « Festeno dum la Pesto » en Anglujo. Ni prezentos rapide tiujn kvar teatraĵojn kaj provos trovi ilian unuecon.

Mozart kaj Saljeri estas la plej mallonga. Ĝi konsistas el du scenoj. Ni havas de ĝi esperantan tradukon, kies dua eldono aperis en 1907, sub la plumo de Lojko. Tiu traduko estas fidela sed ne tre bona. La temo estas la tragedio de la envio, la konflikto inter talento kaj genio. La itala komponisto Antonio Saljeri (1750-1825), amiko kaj admiranto de Mozart venenas ĉi-lastan, ĉar li ne povas taleri, ke Mozart kreas geniajn verkojn kvazaŭ sen klopodo kaj laboro, dum li, dediĉinte sian vivon al studado kaj laborego, al pena akiro de la komponista tekniko, produktas verkojn evidente malpli geniajn. Tiu murdo de Mozart fare de Saljeri ne estas historia veraĵo, sed ankaŭ ne elpensajo de Puŝkin : ĝi estis fakte disvastigita legendo en tiu epoko.

Sed en sia monologo, Saljeri aperas ne nur kiel malnobla enviulo sed kiel defendanto de la arto kontraŭ la sovaĝa genio de Mozart, la pastro de la religio de arto, murdanto de la herezulo kaj individuisto. « Ĉu alĝigos arton li ? Ne ! », diras li.

La Festeno dum la Pesto estas fakte adapto de unu sceno el la drama poemo de John Wilson « La pesta

urbo ». Sur la strato festenas viroj kaj virinoj spite al la ĉie minacanta morto. Unu virino kantas elegian kanton kaj la prezidanto de la festeno gloras la peston kaj la morton. Alvenas pastro, kiu malbenas tian sakrilegian festenon kaj memorigas al la prezidanto, ke ankaŭ ne longe li ploris sur la kadavroj de la patrino kaj de la edzino. La prezidanto rifuzas sekvi lin, sed kaptite de la rememoro pri la mortinta edzino, li falas en duonfrenezon, dum la pastro foriras kaj la festeno plu daŭras.

La Avara Kavaliro estas prezentita de Puŝkin kiel tradukaĵo el la angla lingvo. Sed tio estas pura mistifiko. Ĝi konsistas el tri scenoj. La unua prezentas la konflikton : la juna kavaliro Albert ne povas teni sian rangon ĉe la kortego de la duko, ĉar lia patro, la barono, estas ege avara. Albert devas pruntopreni monon de judo, kiu sugestas al li veneni la patron. Albert forĵetas tiel malnoblan proponon. La dua sceno estas monologo de la barono en la kelo, kie estas enŝlositaj la trezoroj, kiujn li pie konservas kaj kultas. Ĉe la tria kaj fina sceno, Albert plendas ĉe la duko pri la avareco de la patro. Por sin defendi la patro kalumnias la filon. Sekvas drameca sceno dum kiu la patro provokas la filon al duelo ; tiu lasta akceptas sed la barono mortas subite pro emocio.

La fonto de tiu tragedio estas evidente Molière. La avareco de la barono estas tragika pasio. Li adoras la oron pro la potenco, kiun ĝi donas. « Mi regas ! », li krias. Kontemplantе siajn riĉaĵojn la barono sentas kvaŝaŭ sadisman plezuron. Li estas asketo, kiu trudis al si suferojn kaj volas trudi ilin al la aliaj. Kiel Saljeri estas la pastro de la religio de la arto, la barono estas la pastro de la religio de la mono. Plie per sia avareco la barono ĉesis esti kavaliro ; Alberto, preta mortigi sian patron en duelo, ankaŭ perdas la kavaliran honoron... Tio do estas ankaŭ la tragedio de la morto de la kavalira moralo pro la kreskanta potenco de la morto. Tiu interna morto de la herooj, tiu morto de historia epoko, kaj la fizika morto de la barono donas al la teatraĵo sian tragikan karakteron.

La Ŝtona Gasto estas la plej ampleksa kaj certe la plej genia el la « malgrandaj tragedioj ». En ĝi Puŝkin pritraktas la temon de Don Juan. Sed li pritraktis tiun temon en tute originala maniero. En la unua sceno Don Juan alvenas Madridon kun sia servisto, kaŝe, ĉar li estis ekzilita post la murdo de la Komandoro. Li ekvidas Dona

Anna, la vidvino da la Komandoro kaj ekinteresiĝas pri ŝi. En la dua sceno Don Karlos, malamiko de Don Juan kiu mortigis duele lian fraton, gastas ĉe Laŭra, amatino de Don Juan. Tiu lasta alvenas neatendite kaj mortigas Don Karlos duele. Laŭra kaj Don Juan amoras apud la kadavro. En la tria sceno Don Juan, maskovestita, kiel monaĥo, konatiĝas kun Dona Anna. Li malkovras al ŝi, ke li ne estas monaĥo kaj ke li amas ŝin. Ŝi promesas al li rendevuon. Fine de la sceno Don Juan invitas la statuon de la Komandoro ĉeesti lian rendevuon kun Dona Anna. La kvara sceno okazas ĉe Dona Anna. Don Juan malkovras, ke li estas la murdinto de ŝia edzo. Ŝi ne kuraĝas lin mortigi sed fiksas al li alian rendevuon. Tiam alvenas la statuo, kiu forkondukas Don Juan.

En kio kuŝas la originaleco de la teatraĵo de Puŝkin ? En la komedio de Molière Don Juan estas senkora cinikulo ; ĉe Puŝkin li estas simpatia. Li bezonas ŝanĝon pro temperamento de poeto kaj artisto. Li havas similulinon en la persono de Laŭra. Ambaŭ prezentas la plej perfektan idealon de libereco en amo. La Don Juan de Puŝkin ne serĉas facilajn viktimojn, sed bezonas venki malfacilaĵojn ; pro tio li volas konkeri Dona Anna. Li estas plena ne je vulgara voluptemo sed ĉefe je intelekta orgojlo. La « Ŝtona Gasto » ne estas dramo de la amo, sed la tipe puŝkina tragedio de la nesatigebla pasio. La Komandoro estas la pastro de la religio de la Socia Ordo kiu interrompas la aktivecon de la soleca heroo, de la individuisto, de la poeto Don Juan.

Mi provis evidenti ĝi riĉaĵojn de tiuj malgrandaj tragedioj, kiuj aspektas tre klasikaj apud la romantika Boris Godunov. Sed ni vidas ankaŭ la similecon inter la tragedioj de Puŝkin. Ĉiu el ili estas la tragedio de nesatigebla pasio. Al la ambiciulo, kiu estas samtempe ĝuemulo kaj senzorgulo, kontraŭas la principo de konserveco de ordo. Kelkajn jarojn poste, en 1837, la Socio interrompos la vivon de la poeto Puŝkin.

Puŝkin planis kelkajn aliajn « malgrandajn tragediojn », kiujn li ne sukcesis finverki, kaj estas verŝajne, ke tiu « eksperimenta teatro », (kiu naskis ĉefverkojn) estis nur la preparo, la skizo de nova formo de teatro. kiun Puŝkin, frue mortinta, ne povis efektivigi.

Michel DUC-GONINAZ.



CU VI MALFRUAS ?

TUJ SENDU VIAJN

Abonojn al
la peranto en via lando aŭ

al : **P. BABIN**, 13, Bd de la Chauvinière
44 - NANTES p.k. Nantes : 2.813.61

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 80 jaroj naskiĝis en La Chaux de Fonds (Svisio) :

LE CORBUSIER. — Tiu arkitekto svis-naskita sed franc-nacia estis tre fama dum la lastaj jardekoj pro siaj revoluciaj ideoj pri la konstruado. Liaj nubsrapuloj en Marseille kaj Nantes, liaj planoj kaj konstruado de la Hindia ĉefurbo Tschansigarh, lia preĝejo en Ronchamps (Francio), liaj konstruaĵoj en la kvartalo Hansa de Berlino, famigis lin en la tuta mondo.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Coombe (Britio) :

John GALSWORTHY. — Angla aŭtoro kiu verkis romanojn kaj teatraĵojn en kiuj li atakis la hipokritecon de la socia vivo kaj kritikis la anglajn morojn de la Viktoria epoko. Li ricevis la Literaturan Nobel-premion. Lia plej grava romano estas : « La sagao de Forsytes », grupo de rakontoj pri familio, simbolo de amo, persona posedado kaj familia aŭ individua egoismo.



Antaŭ 500 jaroj naskiĝis en Roterdamo :

Erasmus DE ROTTERDAMO. — Eminentia humanisto, li publikis grekajn kaj latinajn verkojn. Oni konsideras lin aŭtoro de la nuntempe parolata greka lingvo. Per sia reformacia fervoro li influis la relegion. Ĉe la komenco li simpatiis kun la Reformacio sed poste iris propran vojon.

La scienco kaj la moderna vivo

Kial paroli hodiaŭ pri la scienco kaj la moderna vivo? Tre simpla estas la kaŭzo: La moderna vivo estas nia vivo, kaj certe valoras kelkfoje, konscii pri la faktoj, kiuj faras ke tiu moderna vivo ne similas la vivon de niaj praaĵoj; kaj la plej grava el tiuj faktoj kiuj igas originala nian epokon, sendube estas la Scienco.

Fakte oni tre ofte aŭdas ke nia mondo estas komplete regata de la Scienco. Kelkaj personoj bedaŭras tion, ĉar, laŭ ili, ni ne plu havas tempon kaj lokon por vivi vere homan vivon. Kontraŭe aliaj homoj fieras, ĉar ili vivas en epoko riĉoplena je konoj, vojaĝoj, k.t.p...

Antaŭ ol vidi kiel la scienco agas por ŝanĝi nian ĉiutagan vivon mi provos klarigi, kio precize estas Scienco.

Magia vorto por kelkaj, teruriga vorto por aliaj, scienco kaŝas tre malsimilajn aktivajojn. Per tiuj vortoj, mi volas paroli pri la granda diferenco kiu ekzistas inter la fundamenta scienco, kaj la teknika progreso: Oni tro ofte intermiksas tiujn du aspektojn.

La diferenco estas duobla: unue la laboro estas tre malsama en fundamenta kaj teknika serĉadoj. Due, la rezultoj, kiujn oni povas atingi, aperas tute malsimilaj.

Kio estas fundamenta serĉado? Ĝi estas konstanta lukto kontraŭ la naturo por koni ĝin. Ĝi ankaŭ estas laboro, kiu preskaŭ neniam donas rezultojn. Por pli bone komprenigi tion mi prenos, kiel ekzemplon, mian propran metion; laborante en universitato, mi serĉadas en laboratorio, kie oni studas fundamente la konduton de kelkaj metaloj.

La nuna problemo, kiu prezentigas al mi, kaj al kelkaj el miaj kolegoj estas la jena: Ni varmigas specialan miksaĵon de du aŭ tri metaloj ĝis iu difinita temperaturo kaj poste, tre rapide malvarmigas, faligante ĝin en akvon, kies temperaturo estas la normala temperaturo. Tiam ni denove varmigas nian metalon ĝis temperaturoj malpli altaj ol la unua,

kaj ni observas fenomenon kiu ni nomas « maturiĝado ». Tiu « maturiĝado » konsistas el ŝanĝoj en la metalo, kiuj okazas unu post la alia, kiam pasas la tempo de post la unua malvarmigo. Oni ne konas precize kio okazas dum la « maturiĝado », oni nur konas uzeblan rezulton de tiu fenomeno: La metalo multe malmoligas.


Tiu ekzemplo montras kiel, kaj kial laboras fundamenta serĉisto: la fenomeno estas uzata sed oni ne konas ĝian meĥanismon. Kiel unua konkludo, ni do povas diri, ke la fundamenta laboro ne havas konkretan rezulton; ĝi estas nur konstanta studado.

Ni revenu al la problemo por vidi nun en kio konsistas tiu laboro: Kiel ni respondos la demandon? Kompreneble ni ne havas tute krudan problemon; jam pluraj personoj studis la aferon, kaj eldonis teoriojn. Bedaŭrinde tiuj teorioj estas malsimilaj, kaj eĉ kelkfoje kontraŭdiras unu la alian. Tial ni havas plurajn vojojn: ni povas elekti nur unu teorion kaj provi ĝin ĝis-funde. Tio kompreneble estas granda laboro ĉar neniu detalo devas esti forlasita, sed tiu laboro povas daŭri plurajn jarojn kaj doni nenium pozitivan rezulton; tiam ni trovis, ke la elektita teorio ne taŭgas, kaj la tuta laboro estas absolute perdita. Ni tamen povas elekti alian vojon por studi nian problemon: Certe en ĉiuj teorioj estas tre valoraj punktoj, sed ankaŭ tute ne taŭgaj estas kelkaj aliaj punktoj. Tial ni devas fari sintezon de ĉiuj teorioj, provi kiel eble plej precize tiun sintezon, kaj modifi ĉiujn detalojn kiuj aperas ne taŭgaj dum la eksperimentaj provoj.

Mi sufiĉe longe parolis pri tiu aspekto de serĉado ĉar mi konas ĝin. Kompreneble tio ne estas la nura aspekto.

Mi nun volus paroli pri tiuj tre konataj serĉistoj: tiuj, kiuj eltrovas novajn fenomenojn. Tiuj estas tre malmultaj, kaj oni diras ke ili sukcesis nur pro bonŝanco. Tiu aserto certe estas vera ĉar, dum la serĉisto laboras pri iu laboro, aperas nova fenomeno. Nur la hazardo estas kaŭzo de tio. Sed en tiu preciza momento la serĉisto devas estis preta akcepti kiel novan fenomenon, iun strangan, kiu, en la ĉiutaga serĉado, povas aperi nur kiel eraro; ni faras erarojn tiel ofte dum niaj eksperimentoj, kaj la nova fenomeno tute ne anoncas sin!

Tute alie iras la teknika progreso. Ĉi tie, konkreta rezulto estas absolute necesa; ĝi estas la celo de la laboro. La teknika serĉisto devas ektrivi novajn ideojn, li devas krei novajn aparatojn. Ni tuj vidas, kia diferenco ekzistas inter fundamenta kaj teknika serĉadoj. Kiel ekzemplo de teknika progreso ni vidu kiel naskiĝis la unua aŭtomobilo. Ni imagu ke ni ne konas la eksplodmotoron; ni tuj vidas kiom granda estas la problemo, ĉar precize, ne ekzistas problemoj! Unue oni devas scii ke, kiam estigas sparko en miksaĵo el aero kaj benzino, tiam okazas eksplodo. Oni devas poste, uzi tiun eksplodon kiu fakte, aperas tute ne regebla. Mi tiel povus lis-



KULTURAJ KAJEROJ

1967

SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

El Gresillon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Robert Houdin

Majstro de la magiistoj (II) A. Motillon

La Abatejo de Solesmes

Puŝkin

La malgrandaj tragedioj M. Duc-Goninaz

Gravaj datrevenoj

Scienco kaj moderna vivo

J.-P. Guillot

Fantazioj

S-ino Darsi kaj la kuracistoj Tr. C.-L. Dean

Por via distro

Nia Konkurso P. Chevalier
Amuzaj problemoj J. Salasc

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

tigi centojn da detaloj nur pri aŭtomobilo, kiuj aperas nun-kiel detaloj ĉar ni konas ilin, sed kiuj fakte estis veraj obstaklegoj.


Sed tiuj ekzemploj estas multe pli simplaj ol la realaj okazaĵoj. Ĉiutage fundamenta serĉisto bezonas novajn aparatojn kiujn li-mem devas krei, ĉiutage, ankaŭ, la teknika serĉisto uzas eltrovojn faritajn sur la fundamenta kampo. Bona ekzemplo de tiu senĉesa intermiksado estas la nuntempaj progresoj koncerne la sputnikojn. Por konstrui la sputnikojn oni bezonas novajn metalojn, novajn karburarojn, k.t.p.... Sed ŝiaŭve, la sputniko estas ilo por la fundamenta serĉado pri gasoj ĉirkaŭ la tero, pri konduto de la homoj en specialaj kondiĉoj, k.t.p....

Nun estas finita nia trarigardo de la scienco, kaj estas tempo fari denove la demandon : Kiel la scienco faras nian nuntempan vivon malsimila al la vivo de niaj prauloj ? Mi vidas plurajn aspektojn de tiu agado : unue estas la industriigo kiu grandigas la urbojn. Tio kreas senĉesan movadon de objektoj, de homoj, k.t.p. Ni, tiel, pasigas plurajn homojn de la tago en veturiloj, irante jen por labori, jen por libertempi, sed ĉiam kune kun aliaj personoj, sen iu momento de ripozo. Tiun frenezigan vivon ni nomas la moderna vivo ! Stranga rezulto de la progreso ! Kaj progreso donis al ni alian grandan malbonaĵon : Ek de la 6a de Aŭgusto 1945 ni ĉiuj timegas, ĉar en tiu tago Hiroŝima estis komplete detruita de atombombo. Eĉ se, pro politikaj kaŭzoj, kelkaj personoj opinias ke tiu aŭ tiu alia ŝtato rajtas havigi al si tiun armilon ĉar aliaj jam havas ĝin, neniuj povas nei ke la atombombo kreis tute novan homan senton, teruran dubon : ĉu, iun tagon tiuj armiloj ne estos uzataj, ĉu, post la unua impulso, la tero ne iĝos brulanta bulo, ĉu, tiam, la homoj ne estos senpovaj por haltigi la ĝeneralan detruon ?

Timo, frenezigo, ĉu nur tion alportis al ni la scienco ? certe ne : Ni ja ne plu havas tiajn terurajn malsanojn kiel konis niaj gepatroj. Hodiaŭ la infanoj ne plu mortas en teruraj suferoj kiel okazis antaŭ ne longe. Medicino faris grandajn progresojn kiujn ni profitas. Bedaŭrinde tiuj progresoj ne okazis same en ĉiuj direktoj : La serĉadoj pri kancero ankoraŭ ne atingis rezulton. Kelkaj personoj tute ne komprenas kial, kaj tio estas absolute komprenebla : tiu malsano ne estas konata ; kiel, do, la kuracistoj povus lukti kontraŭ malsano kiun ili ne konas. Sed la pli multo de la personoj, kiuj vidas belegajn rezultojn de la scienco ne komprenas ke tiu terura malsano kiu tuŝas ĉiujn familiojn ne havas kuracilon.

Pli ĝenerale la scienco alportis al ni komforton, kaj ni povas diri ke bonfarto estas aspekto de komforto. Je tiu ĝenerala vidpunkto scienco donis al ni la eblecon havi liberan tempon por legi aŭ babilu, por vojaĝi kaj koni nian mondon, por lerni aliajn ling-

vojn kiel Esperanto, k.t.p.... Tio signifas ke scienco alportis al ni pli da tempo por vivi nian homan vivon. Per tiuj vortoj mi volas substreki la fakton ke la scienco, laŭ la nuntempa senso de la vorto, ne estas nur granda kvanto de konoj. Oni ne povas dubi ke kelkaj el niaj prauloj havis multajn konojn, kiujn ni iom post iom malkovras denove. Efektive oni diras ke la Egiptoj havis kiel unuon por mezuri la distancojn, la metron, nian modernan unuon kiu, kiel vi certe scias, estis kalkulita laŭ la grandeco de la terbulo-mem. La nura konkludo de tiu aserto estas do ke la Egiptoj sciis ke la tero estas bulo kaj konis ĝian grandecon ! Eble tio estas nur legendo, sed ĝi estas nur ekzemplo de ĉiuj konoj kiujn jam havis la Egiptoj, almenaŭ kelkaj Egiptoj. Efektive, se kelkaj personoj dubas pri la egipta scienco ĉiuj interkonsentas por diri ke la popolo absolute nenion sciis ; ĝi havis nur la rajton kredi tion kion asertis la sciantaj eminentuloj. Ni tiel vidas kian evoluon konis la scienco : ĝi nun estas la afero de ĉiuj homoj.



Por konkludi ni povas diri ke la scienco, kiel ĉiuj homaj aktivaĵoj, similas duoblan tranĉilon, ĝi estas samtempe bona kaj malbona por nia ĉiutaga vivo. Ni tamen memoru ke la sciencistoj laboras en la sama direkto kiel ni ĉiuj esperantistoj : Ili luktas kontraŭ nescio, ili provas kompreni la mondon kaj la homojn, ili ne interesiĝas pri landlimoj sed studas la tutan mondon.

Jean-Paul GUILLOT.

FANTAZIAJO

Sinjinorino Darsi kaj la kuracistoj



Sinjinorino Darsi estis riĉa. Vere ŝi estis tre riĉa. Efektive ŝi estis, tiel riĉa, ke pro tio ŝi malsaniĝis. Ŝi suferis pro multmona depaĝo de la banka konto. Ŝi jam ĉien iris; ŝi jam ĉion vidis; ŝi jam ĉion faris. Ŝi posedis tiom da diamantoj, kiom ŝi povis surmeti, kaj tiom da perloj, rubenoj! Tio da silkajoj kaj atlasoj, veluroj! Tio da plumoj kaj puntoj, falballoj! Ekzistis neniu loko, kien ŝi ne povis iri; ekzistis nenio, kion ŝi ne povis havi; nenio, kion ŝi ne povis fari, — krom esti feliĉa. Ŝin tedis fari tiun agon, kaj ŝin tedis fari la alian, — kaj ŝin plej tedis fari nenion. Ŝin tedis rajdi kaj veturi; ŝin tedis stari kaj ŝin tedis sidi. Ŝin tedis manĝi, trinki kaj dormi.

Tial ŝi alvokis kuraciston, Doktoron Blanko. Li konsilis al ŝi pilolojn. Ŝi pli malsaniĝis. Tial ŝi venigis alian kuraciston, Doktoron Nigro. Li konsilis al ŝi pulvorojn. Ŝi ankoraŭ pli malsaniĝis. Tial ŝi turnis sin al tria kuracisto, Doktoro Verdastelo. Li estis moderna kuracisto, tre moderna kuracisto. Li mem diris, ke li estas tiom metafizikisto, kiom korpokuracisto. « Kiel vi malsanas? » li demandis. « Ĉiel », diris Sinjinorino Darsi. « Vi havas belegan domon », diris la kuracisto. « Mi enuas en ĝi », respondis la sinjinorino. « Vi havas belajn juvelojn ». « Mi enuas pri ili ». « Vi havas belan vizaĝon ». « Mi enuas pri ĝi ». « Kiel vi pasigas la tempon? ». « Ne mi pasigas la tempon. Ĝi pasas mem propramove. Mi estas tro laca por pasigi ĉe la tempon. Miaj manoj estas tro lacaj por ludi. Miaj okuloj estas tro lacaj por legi. Efektive mia cerbo estas tro laca ĉe por... pensi. »

« Kio vin tiel lacigis? » demandis Doktoro Verdastelo. « Tio mi deziras, ke vi eltrovu », diris sinjinorino Darsi. « Tio mi jam trovis, kara sinjinorino. Mi ĝin trovis senprokraste. Fakte mi ĝin trovis, tuj kiam mi vin ekrigardis. Mi ĉe povus diri, ke mi ĝin ektrovis antaŭ ol mi vin ekrigardis. Mi ĝin antaŭkonjektis, tuj kiam mi ekvidis vian hejmon. » « Ho ve! » diris sinjinorino Darsi. « Kaj kio estas al mi? Kiel oni nomas mian... plenditaĵon? » « Tute prave vi nomas ĝin plenditaĵo », diris doktoro Verdastelo. « Ĝi ne estas malsano. Ĝi estas nur plendo. Sed ĝi estas tre grava... por vi. Mi ne donos al ĝi nomon. Tio eble vin ofendus. La nomo ne estas belsona. » « Kaj ĉu vi povos doni al mi helpon? », demandis sinjinorino Darsi. « Mi povas klopodi ». « Ho ve! Ĉu vi povas nur klopodi? Ĉu estas necese lasi la ceteron al la naturo? ». « Jes, mi devos lasi la ceteron al... via naturo », respondis la doktoro. « Ĉu vi skribos recepton? ». « Se vi deziras ». Kaj Doktoro Verdastelo skribis kelkajn vortojn sur peceto de papero. « He, la pilolojn mi jam enlulis, kaj la pulvorojn », sopiris sinjinorino Darsi. « Mi receptos nek pilolojn, nek pulvorojn ». « Ĉu mi devos interne

aŭ ekstere uzi vian recepton? ». « Interne », diris Doktoro Verdastelo kun mistera rideto.

Li donis la peceton de papero al sinjinorino Darsi kaj foriris. Sinjinorino Darsi donis la recepton al la sekretario. La sekretario donis ĝin al la ĉambristino. La ĉambristino donis ĝin al la ĉefservisto. La ĉefservisto donis ĝin al la lakeo. Kaj la lakeo portis ĝin al la apotekisto.

La apotekisto rigardis la peceton de papero, legis la skribaĵon trovigantan sur ĝi kaj, kun tre mirigita vizaĝesprimado, redonis ĝin al la lakeo. « Ĉi tio ne estas por mi », li diris, « ĝi estas por sinjinorino Darsi ». Tiam la lakeo reportis la recepton al la ĉefservisto. La ĉefservisto ĝin redonis al la ĉambristino. La ĉambristino ĝin redonis al la sekretario. Kaj la sekretario ĝin redonis al sinjinorino Darsi, dirante: « La apotekisto diras, ke tio ne estas por li. Li diras, ke ĝi estas por vi ». « Por mi? » diris sinjinorino Darsi. « Kiel tede! Mi estas tiel laca! Mi estas tiel enuigita! Mi estas tiel malforta! Mi estas tro laca por legi ĝin. Estas necese, ke vi legu ĝin al mi. Kion ĝi diras? » La sekretario rigardis la peceton de papero kaj tuj lia vizaĝo ruliĝis. « Kion ĝi diras » denove demandis sinjinorino Darsi. « Kial vi ne legas ĝin al mi. » « Mi... mi ne komprenas. » « Nu, do, ne estas necese, ke vi ĝin komprenu », diris sinjinorino Darsi. « Se ĝi estas por mi, mi ĝin komprenos. Kion ĝi diras? ». « Ĝi diras: recepto por sinjinorino Darsi, kun komplimentoj de Doktoro Verdastelo: FARU ION POR IU ». « Kion tio signifas? » ekkriis sinjinorino Darsi. « Mi... mi jam diris al vi, ke mi ne komprenas », respondis la sekretario. « Kial vi ne komprenas? Por kio vi supozas, ke mi dungis vin? Mi estas tro malforta por malfirmi miajn leterojn, tial mi havas vin por ilin malfirmi. Mi estas tro malforta por kompreni miajn leterojn, tial mi havas vin por ilin kompreni. Kaj se mi ricevas frenezajn leterojn de frenezaj kuracistoj, kaj se mia sekretario estas tro freneza por klarigi al mi la staton de la afero, ankaŭ mi mem nepre frenezigos! »

Sinjinorino Darsi ekscitiĝis, ĝis ŝi fariĝis tute histertia. Tamen, dum la tuta cetero de tiu tago kaj dum la tuta sekvanta nokto sinjinorino Darsi aŭdis la vortojn sonantajn en ŝiaj oreloj vidis ilin dancantajn antaŭ ŝiaj okuloj: FARU ION POR IU. Ŝi preskaŭ demandis sin ĉu estas io bona en tiu recepto. Sed ŝi baldaŭ forgesis la novan kuraciston kaj liajn ideojn, liajn impertinentaĵojn, liajn malrespektaĵojn. « FARU ION POR IU ». Kia ideo! Kiam ŝi estas tro malsana ĉe por fari ion por si mem!

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En ĉi tiu numero komenciĝas nia konkurso 1967-1968. Ĝi konsistas el ok problemoj, aperontaj en kvar sinsekvaj numeroj de la revuo.

Nur abonintoj rajtas partopreni tiun konkurson, kies premioj estos :

- 1) dusemajna senpaga restado en Gresillon ;
- 2) unusemajna senpaga restado en Gresillon.

Tiujn premiojn la gajnintoj povos ĝui dum la somero 1968-a aŭ dum la somero 1969-a. Ni petas ĉiujn partoprenantojn, ke ili bonvolu sendi siajn solvojn antaŭ la fino de la monato sekventa tiun de la apero de la revuo, do por la du unuaj problemoj, antaŭ la fino de Novembro 1967. Ili bonvolu kunsendi, almenaŭ unufoje, la banderolon de la revuo.

Sendu viajn respondojn al :

S-ro P. Chevalier, 19 Bd, G.-Lauriol, 44 - Nantes Francujo.

Unua problemo : (20 poentoj)

En la ĉi subaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste elektita, sed estos deprenita 1 poento por ĉiu netaŭga vorto.

- 1 — Pli feliĉa estas donanto ... prenanto.
- 2 — Li estas la portreto de ... patro.
- 3 — Se vi donas mielon, donu ... kuleron.
- 4 — Malsato ..., bone gustigas la manĝon.
- 5 — ... laboro ne venas oro.
- 6 — Tempo estas mono. Tempo estas valoro... al oro
- 7 — Multaj vokitoj, sed ne multaj ...
- 8 — Ju pli da babilado, ... pli da pekado.
- 9 — Plej bone ridas, kiu ... ridas.
- 10 — Ne helpas ... al malbelulo.

Dua problemo : (20 poentoj)

VORTPLEKTAJO

1. Parto ; 2. Palto ; 3. Pulio ; 4. Brava ; 5. Karoto ; 6. Kanto ; 7. Arabo ; 8. Tereno ; 9. Sfero ; 10. Monto ; 11. Barako ; 12. Listo ; 13. Krano ; 14. Karato ; 15. Lakto ; 16. Korvo ; 17. Kareso ; 18. Buklo ; 19. Palaĉo ; 20. Korpo ; 21. Borilo ; 22. Omaro ; 23. Sulko ; 24. Pinto ; 25. Peruko ; 26. Tremi ; 27. Litero ; 28. Turno ; 29. Berilo ; 30. Lando ; 31. Salivo ; 32. Afero.

El ĉiu de la supraj 32 vortoj elprenu unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 32 literoj en la numerita vico formas tre interesan, nekontesteblan pravan kaj por multaj viroj tre konsolan aserton de Austin O'Malley.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solve de la antaŭaj problemoj

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
I	K	A	O	S		E	T	A	P
II	I	S	K	I	A	T	I	K	O
III	E	T		A	R	A		R	E
IV	S	E	M		O		R	O	T
V		R	O	Z		M	U	S	
VI	M	I	T		I		U	T	A
VII	I	S		I	L	E		I	G
VIII	E	K	O	N	O	M	I	K	O
IX	N	O	O		A	S	O	J	

ENIGMO

Trovotaj vortoj : ŝelo, ŝelko ; mano, Manio ; Paro, paruo ; pulo, pulvo ; tempo, tempio ; salo, salvo ; alo, aloo ; luko, lukso ; pino, pinto ; irido, iridio ; revo, revuo ; valo, valvo ; lamo, lamio ; rano, rando ; halo, haloo ; uro, urso.

La trovota frazo estis : « kiu vivos, tiu vivos. »

NOVA PROBLEMO

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8
I								
II								
III								
IV								
V								
VI								
VII								
VIII								

Horizontale : 1. Muzeestro. — 2. Ŝirmi per flava metalo. — 3. Manuzi. — 4. Prepozicio ; juvelŝtono (rad.). — 5. Remparo kontraŭ inundo ; lirika poemo. — 6. Faroj. — 7. Havante korsenton. — 8. Enkorpiĝado (rad.).

Vertikale : I. Teatraĵo (rad.). — II. hemia elemento (rad.) ; en ludkartoj (rad.). — III. Antikva alfabetlitero (rad.) ; ŝirmi per gluejaĵo. — IV. Kamarado ; inklina sufikso (rad.). — V. Sablono ; korinklini. — VI. tetraĝo (rad.). — VII. Rondigado. — VIII. Instrumentoj.

GRAMATIKO PER BONHUMORO


« **Kia** montras kvaliton, naturon, specon.

Kiel signifas « kiamaniere », « kiagrade ».

Kiom signifas « kia nombro », kia kvanto ».

Kia estas adjektivo.


Kiel kaj **Kiom** estas adverboj. »



— Kiom ofte mi devos diri al vi, ke mi suferas pro tonsilo-difekto !



— Kiel plena je neatenditaĵoj estas nia profesio !



— Kia progreseculo mi estas !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczy, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).

Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anonciĝajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo